Estimataj gastoj, karaj geamikoj,

Mi tre ĝojas, ke nia kolegio okazigas la simpozion hodiaŭ. Antaŭ ĉio permesu min nome de nia kolegio kaj mi mem esprimi sinceran bonvenon al ĉiuj ĉeestantoj!

Komence de la prepara laboro ni, kiel organizanto de la 45-a ILEI-konferenco, ekdeziris okazigi la simpozion por interŝanĝi kaj reciproke lerni inter fakuloj de Kunming-aj altlernejoj kaj alilandaj esperantistoj, kaptante la bonan ŝancon ekstreme maloftan feloĉon. Finfine ni sukcesas laŭdezire.

En la hodiaŭa simpozio partoprenas ne nur famaj fakuloj el Kunming-aj altlernejoj, sed ankaŭ esperantaj fakuloj el nia kaj aliaj landoj. La simpozio donas al ni bonan ŝancon por transfaka kaj transkultura interŝanĝo. Dum mallongaj tri monatoj ni kolektis por la simpozio pli ol 30 enhavriĉajn disertaĵojn, kiuj enhavas multajn fakojn, inkluzive lingvon, arton, transkulturan komunikado ktp. Por tio mi elkore dankas al ĉiuj verkistoj de la disertaĵoj.

Krome alilandaj esperantistoj ankaŭ preparas altnivelajn artikolojn. Ni kun granda intereso atendas iliajn prelegojn.

La konferenca temo estas "La arto de komunikado, komunikado de artoj". La konferenco donas al ni bonan ŝancon por vastigi nian vidkampon. Komunikado estas arto. Ni devas posedi la komunikadan arton. Krom lingvo ni ankaŭ ofte uzas diversajn artojn ekz. pentraĵojn,

kantojn, dancojn, prezentadojn kaj aliajn, por komunikado kaj interŝanĝo.

Iuj specialistoj asertis, ke ĝis 80 procentoj de la interhoma komunikado estas ekstervorta. Tial arto estas grava portanto por nia komunikado.

Mi forte deziras, ke la simpozio donas al ĉiuj ĉeestantoj pluajn inspirojn kaj pensojn.

Plenan sukceson al la simpozio!

Sanon al vi ĉiuj!